# EKO 2022 Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA · ILEI · IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 41> • AMO 88, 89 • Projekto • EK en UK • Eo-Tago < julio 30**

## AMO 88 – programo

Sukcese okazis tiu nova AMO-seminario en la kadro de la hibrida 6-a Internacia Simpozio okazigita en Jelena Góra, Pollando, en la 25-a de julio. Ĝi okazis kunlabore kun la Karkonoŝa Akademio de Aplikataj Sciencoj (Karkonoska Akademia Nauk Stosowanych)

La temo estis: '135 jaroj de Esperanto - homoj, lingvo, kulturo kaj okazintaĵoj'. Jen la listo de la prelegoj:

1. Goro Christoph Kimura (Japanio) – 'Esperanto el lingvosociologia vidpunkto'.
2. Josip Pleadin – 'La tradicio de Esperanto en Kroatio kiel nemateria kultura heredaĵo'.
3. James Piton (Brazilo) –'Bildkarta vizito al la Universalaj Kongresoj, kiujn Zamenhof partoprenis'
4. Stefan MacGill (Hungario): '135 jaroj de Esperanto – kiom vere tutmonda?' (alkroĉita)

Ni aldonos pliajn el tiuj prelegoj al postaj EKO-komunikoj, post solvo de teknikaj obstakloj pri la vidigo.

## AMO 89 tuj sekvis kadre de VEKI 3

ILEI komunikas, ke VEKI 3 – ĝia virtuala kongreso temos ne nur pri pedagogia evento! Enestos ses koncertoj!

- Sabate (la 23-an de julio): Sepa kaj Asorti
- Dimanĉe: Chiara Raggi
- Lunde: Clarissa Sabatini
- Marde: Piero Nissim
- Merkrede: Anjo Amika
- Vendrede: Ĵomart kaj Nataŝa

Ĝis nun aliĝis 295 esperantistoj el 59 landoj al la 3-a virtuala Esperanto-kongreso de ILEI (VEKI-3)! La programo entenas pli ol 30 interesajn prelegojn! Ankaŭ ĉi-jare kadre de VEKI okazis ILEI-Simpozio kaj AMO-Seminario. VEKI nun okazas, eĉ SMG aŭskultas kaj spektas ĝin dum la redaktado!

La ĝisnunan programon de la evento - kune kun priskribo de ĉiu prelego kaj biografieto de la preleganto - vi povas vidi en: https://www.espero.ir/eo/veki-3/

Ricevita de Jozefo Nemeth de la Hungara sekcio

Postskribo de SMG. En la vespero de la 28-a de julioi okazis sukcese AMO 89, kun meze kvardek partoprenantojn el la tuta mondo. Okazis multa produktiva diskutado, aldone al la prezentaĵoj. Raporto aperos en EKO 42

AMO 90 estas nuligita – ne okazos AMO kadre de la UK! Ne venis kontribuoj spite fruan kaj dufojan alvokon al diversaj kontinentoj. La UK mem traktos bone la temon pri indiĝenaj kulturoj,i.a. la kanada

## Projekto pri projekto

Inter la ebloj pri verkeblaj Projektoj al kiuj peti financadon de Eŭropo, unu povus trakti pri komparo inter instruado per diversaj malsamaj instrumetodoj. Oni povas ekzemple kompari Ĉe-metodon kontraŭ tradician Gramatikan metodon kontraŭ Situacian metodon ktp. Tion oni devus fari paralele, per similaj grupoj en similaj cirkonstancoj, ekzemple en la sama kongreso, dum simila tempo-longo de instruado.

La peto de Eŭropa financado povus ankaŭ helpi, ke tiun eksperimenton oni ripetu plurfoje en iom malsamaj cirkonstancoj, ekzemple en kelkaj sinsekvaj kongresoj, de similaj sed malsamaj specoj, ekzemple unu junulara, unu plenkreskula, aŭ en diversaj landaj situacioj, unu en baltaj landoj, unu en nordaj, unu en sudaj ktp.

Se la lando de kongreso estas ekster-eŭropa, en la listo de landoj tiam favorataj por eksteraj rilatoj, ĝi povas esti uzata kaj eĉ favorus la aprobon de la projekto.

Tiu projekto povus aparteni al la malgrandaj projektoj, tiuj financataj per 30 mil aŭ 60 mil eŭroj, sed se pli longa kaj se ĝin lanĉintos Asocio jam venkinta antaŭe Eŭropajn Projektojn, ĝi ankaŭ povus aspiri al la grandaj projektoj, financataj per 120 mil, 240 mil, 400 mil eŭroj. Projekto kun tia temo devus esti prezentata venontan februaron, do estas ĝis tiam tempo por ĝin diskuti kaj trovi la ĝustajn partnerojn, 5 aŭ pli.

esperanto@edistudio.it, Bruĉjo Kasini

## Esperanto-Tago anoncita en la ĉina

Jen estas aperigita la ĉina versio de la mesaĝo de UEA por Esperanto-Tago, Ĉina Esperanto-Ligo ĉinigis la mesaĝon:
https://mp.weixin.qq.com/s?__biz=MzAxOTEzMTk3NQ==&mid=2650562056&idx=1&sn=bc2ab1fe46cd1e4f22429ae7953e9df9&chksm=83c34520b4b4cc36a7475987e467052d2945a327bdbd9efd9528261162e07f94c30840409425&token=599662248&lang=zh_CN#rd

Chen Ji, Komitatano A de Ĉina Esperanto-Ligo, Tel: 86 10 68996130；13126784506
Adr. P.O.Kesto 77, Beijing CN-100037, Ĉinio

## Same en Nederlando

La nova prezidanto de Esperanto Nederland - Marc van Oostendorp - estas aktiva kaj konata lingvisto kiu (kun)redaktas la iom faman novaĵleteron Taalpost (de la asocio *Onze Taal* – Nia lingvo). En ĝi li aperigis la jenan frazon: ‘Marde okazis la 135-a jubileo de la aperigo de la unua libro pri Esperanto.’ kun ligilo al https://www.esperanto-nederland.nl/ned/nieuws.php

La 26-an de julio lin cetere intervjuis Jurgen van den Berg en nederlanda radio-stacio; mi kunsendas informojn pri tio en la nederlanda lingvo.

https://www.nporadio1.nl/programmas/villa-vdb

Aldona informo de Mirejo Grosjean: Marc van Oostendorp - Vikipedio (wikipedia.org)

## En Goma per Esperanto oni subtenas orfojn



Ne retrovebla la sendita akompana teksto (komputiloj, Grrr!), do jen nur la foto. Klare la orfoj ricevas lern-materialojn.

## Kurso en la itala havenurbo Ĝenovo.

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Esperanto A B C
Gvidantonomo: Patrick Morando
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Ĝenovo, Italio
Aldoninto: Patrick75

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27433

## La 44a Esperantologia Konferenco en la Kanada UK

La Centro por Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED), institucio de UEA, estis fondita de Ivo Lapenna en 1952. La Esperantologia Konferenco (EK), organizata de CED kaj unuafoje okazigita en 1978, estas grava programero de la Universala Kongreso de Esperanto (UK). Dum tiuj 7 jardekoj, dekoj da esploristoj estis subvenciataj de CED kaj pluraj aliaj kontribuis al la konferencoj kaj publikaĵoj. Tamen, kio ŝanĝiĝis en Esperantologio kaj Interlingvistiko intertempe? Kiaj estis la teoriaj kaj analizaj kontribuoj de Esperantologio al Lingvistiko kaj aliaj studkampoj?

La 44-a EK, okazonta en 2022 en la Universitato de Kebekio en Montrealo (UQAM), kadre de la 107-a UK, elstarigos la 70-jariĝon de CED per la temo "CED 70-Jara: Bilanco pri la Kontribuoj de Esperantologio al Sociaj, Politikaj kaj Lingvistikaj Fakdebatoj". La 44-a EK okazos ĵaŭdon, la 11-an de aŭgusto, la tutan tagon, de la 9h00 ĝis la 18h00 EDT (UTC-4). Ĉeforganizas ĝin d-roj Guilherme Fians (Universitato Saint Andrews, Skotlando) kaj Mark Fettes (Universitato Simon Fraser, Kanado). La organizantoj bonvenigas ĉiujn ĉeesti la prelegojn kaj partopreni la

publikan debaton. Aldone al la EK okazos ankaŭ publika kunsido de CED, vendredon, la 12-an de aŭgusto. La konferenco okazos en tri partoj:

(1) festsesio honore al la 70-jariĝo de CED;
(2) du sesioj pri prelegoj kaj referaĵoj;
(3) publika debato/ronda tablo, malferma al ĉiuj, pri la akcepto (aŭ malakcepto) de Esperanto kiel studobjekto de la sciencoj.

Inter la prelegantoj estas Sabine Fiedler, Grant Goodall, Jonathan Pool, Gabriel Labrie, Davide Astori, Christer Oscar Kiselman, Bernhard Tuider kaj Pascal Dubourg-Glatigny. Ĉiuj prelegoj kaj biografioj legeblas ĉe la paĝo de CED, Interlingvistiko.net. Ĉiuj partoprenantoj de la 107-a UK rajtas ĉeesti. Por pliaj informoj, kontaktiĝu retpoŝte ĉe gmf7<ĉe>st-andrews.ac.uk kaj mtfettes><ĉe>sfu.ca. Ĉiuj bonvenas aboni la konton de CED ĉe Twitter: @CED_Interling.

## Greziljono somerumas – jen la postpandemia propono

La festa semajno por infanoj kaj familioj ree okazos ĉi-somere! Semajno plena je aktivaĵoj por malgrandaj kaj grandaj en agrabla etoso: ludoj, banado, manlaboroj, sporto, muziko, kanto, Esperanto-kursoj kaj ankoraŭ multe pli.

Mi invitas vin al kastelo Greziljono de mardo, la 16-an de aŭgusto, ĝis ĵaŭdo, la 25-a de aŭgusto. Vidu nian retejon por ĉiuj detaloj.

Ron Winteraeken, MCE Grésillon

## Eĥoj de la Esperanto-Tago el Hispanio

Jen rezulto de la informa agado en Hispanio post sendo de gazetara komuniko, fare de HEF. Por tiuj el vi kiuj kapablas navigi tra la hispana:

Apero de la teksto de UEA en retaj gazetoj:

https://pongamosquehablodemadrid.com/2022/07/26/dia-del-esperanto-2022-amistad-y-justicia-entre-los-pueblos/

https://www.diariosigloxxi.com/texto-diario/mostrar/3836492/amistad-justicia-entre-todos-pueblos

https://www.tercerainformacion.es/articulo/cultura/26/07/2022/asociacion-universal-de-esperanto-amistad-y-justicia-entre-todos-los-pueblos/?p=170612

Artikolo en sporta (!) ĵurnalo :

https://www.mundodeportivo.com/uncomo/educacion/articulo/que-es-el-esperanto-y-quien-lo-invento-52499.html

Intervjuo en regiona (Aragona) radio al la prezidanto de la grupo de Zaragozo:

https://www.cartv.es/aragonradio/podcast/emision/dia-del-esperanto-que-fue-de-esa-lengua

Tonjo del Barrio

========= vortoj: 1150 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj. Reen al kvar paĝoj!

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, kaj retadreson!